

PRINCETON UNIVERSITY

PR


RECEIVED

MAR 25 1922



AMERIKA

ESPERANTISTO



MAR., 1922



OFFICIAL ORGAN
of
THE ESPERANTO ASSOCIATION
of
NORTH AMERICA



AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of
The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall.

Esperanto Association of California, Inc., meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association meets each Monday evening at 8.00 P. M. in Room 12, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7 P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thomson School, XIIth and L Sts., N. W. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

Kolumbia Esperanto Asocio. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 Seventh Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. M. Marootian, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—\$1.00.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the fourth Sunday of each month 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Av.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kosminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas ¼-jaran ĵurnalon, "La Studento," ĵara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Headquarters 133 N. 13th St. Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

CAMBRIDGE 38, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

One Dollar a Year. Single Number 10 Cents.
Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 29.

March, 1922

No. 4/5

ESPERANTO MAGAZINE NUMBER

(See list on Pages 8 and 9.)

LA ESPERANTO GAZETARO

Ni sendas ekzemplerojn de A. E. al ĉiu ekzistanta Esperanta gazeto, konata al ni; po du se ni ne dubas pri la aktuala ekzisto kaj escepte kazojn kie la gazeto neabonebla kompreneble ne volus interŝangi po du. Bonvolu noti nian novan adreson por ĉiu interŝango, reklamajo, aŭ recenzajo; (por abonoj nur, E.A.N.A., 507 Pierce Bldg., Boston 17, Mass.). Iu gazeto ĉi-sube neregistrita aŭ erare registrita, bonvolu sendi al ni ekzempleron kun praviga sciigo.

E. Triumfonta deklamas kontraŭ la nuna gazetfondfebros, tamen ne tute juste, ŝajnas al ni. Vere, plia gazeto estas ofte malhelpo al la estantaj, tamen oni devas distingi. Por ĉiu lingvo bezonas unu gazeton propagandan kaj informan; certe alinacia gazeto ne konsentus presadi la detalajn sciigojn kaj programojn de naciaj societoj. Tia gazeto informa-propaganda estu taŭga al sia tasko nacia; ĝi prezentu la Esperantan kulturon al siaj enlandanoj, kaj la nacian kul-

The address of Amerika Esperantisto is changed with this number to (12 Ash St. Pl.,) Cambridge 38, Mass. Please direct all news matter and other magazine content or correspondence thereon to this address. Subscriptions, payments, and matters concerning the E. A. N. A., including the purchase of books and requests for information are handled by the Esperanto Office, 507 Pierce Bldg., Boston 17, which alone is responsible therefor.

turon al fremdujo. Kaj se la enlanda abonantaro ne sufiĉas por profite presita revuo, oni almenaŭ eldonu manskribitan, hektografitan aŭ mimeografitan gazeton. Ĉe ni, oni pli alte taksas manskribitan kaj ilustritan hektografajon ol mezebonan presaĵon. Ankaŭ rondiranta "gazeto" unuekzemplera de kelkaj verkistoj-legantoj estas valora lernigilo de Esperanto, kvankam ne gazeto; ni ne mallaŭdu ĝin. Se oni deziras obligi ĝin kaj dissendi por ebla interŝanĝo, tio ne estas malaprobinda, ne simpatiaj redaktoroj ne interŝanĝu.

Por apartaj fakoj ni bezonegas apartajn tute en Esperanto gazetojn, sed tiuj konservu sian oficon, ne surpaŝu la oficon de aliaj. Ekzemple, Esperanto Triumfonta mem, nia multe ŝatata ĉiusemajna gazeto, lastatempe iom forlasis sian oficon de novaj-portanto kaj celis per ilustritaj artikoloj imiti belaspektan revuon. Tio ne taŭgas, la kliŝoj ne ŝajnas bele kaj la altigita abono estas tro grava elspezo por multaj. Ni multe preferus la antikvan E. T. je \$2.00 ol la aktuala por \$3.00. Kontraŭe Esperanto (U. E. A.) sur belaspekta papero povas, anstataŭ lingvajn diskutojn kaj disajn novaĵetojn, doni bildojn kaj nur majstre resumi la novaĵojn gravajn. Ĉiu al sia tasko! Pro kio konkurenci? metodo de la ĝis-nuna, sed ne de la esperata mondo. Ni rememoru ke ĉiu Esperanto gazeto, eĉ se ĝi ne valoras la abonon, uzas Esperanton kaj permesas al siaj legantoj uzi ĝin.

Ni deziras, kiel Amerikanoj, forte plendi kontraŭ le tendencan postuli de ni pli grandan abonpagon. Estas ja vere ke Ameriko entenas multe da dolaroj, kaj ke laboristo enspezas kaj elspezas plimulte da oraj diskoj por sia manĝaĵo, loĝejo, ktp. Estas ankaŭ vere ke la neriča popolamaso povas malfacile elŝpari monon por abono al eksterlandaj gazetoj, ĉar Usono estas jam plene kun bonegaj malmultekostaj gazetoj anglalingvaj. Kiel, do oni esperas disvastigi ĉi-tie Esperanto gazetojn kaj Esperanto'n. La nia Nord-Amerika asocio, E.A.N.A., havas eble du centojn da kotizantoj; la enlandanaro havas malmulte da uzo aŭ tempo por Esperanto; malmulte da simpatio por malŝparo de mono. Certe oni malsimpatias evidentan emon punpagigi la Amerikanojn pro la riĉeco de iliaj maloftaj milionuloj. Ĉu oni efektive deziras fortenti Esperanto gazetojn de la Amerikanoj? Ĉu oni opinias ke poveble troviĝas malpatriotoj kiuj volonte subtenos klarvideblan maljustan distingon? Oni diras ke la kurzo estas nur fiktiva. Eble, sed nia kurzo estas ekonomia fakto kiu donos tiom da paperaj promesoj de unu nacio por tiom de alia. Se vi ricevas nete la abonmonon en via nacia valuto, la ora valoro de vialandaj paperpromesoj estas afero de politika opinio, ne de rajto. Se mi povus aboni gazeton por proksimume ĝia enlanda abonprezo pli la poŝtaj elspezoj, mi ricevus justecon; se ne, mi ne volonte abonus, kaj mi forte dezirus protesti kontraŭ la maljusteco al Amerikanoj.

Eĉ plu, oni rimarku ke la efektiva rezultato estas malprogreso de Esperanto en amerikaj rondoĵoj kaj neabono al eksterlandaj Esperanto gazetoj; neaĉeto de Esperantaĵoj. Kiel redaktoro de Amerika gazeto, tio eble donas al ni pli da abonantoj, tamen ni konsilas—"Ne Mortu Anseron kiu Metas Ovojn Orajn." N. W. Frost

The Annual Congress of the E.A.N.A. for 1922 will take place in Toronto, Canada. The date is tentatively fixed as July 12—16.

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA CENTRAL OFFICE NOTES

Have you renewed your subscription to *Amerika Esperantisto*? The stamp now being used "Your subscription expires with this number" is to remind samideanoj in case the bill which is also enclosed should be lost. Get a new subscriber this year.

Have you sent in your dues? If you are Secretary of a Group, please remind delinquents that memberships are due October 1st of each year. Try to enlarge your group membership.

Have you thought about the Horace Dutton Book Fund announced in the January number? This is a permanent fund, and means money on hand to buy books when needed, or to publish a book when a valuable manuscript comes to hand.

Have you subscribed to the Guarantee Fund? Read carefully the announcement on page 16. An immense amount of work is done in the Central Office taking care of correspondence of all kinds, filling orders for books, magazines etc., and by the Editors in preparing the text of the magazine. This cannot be done without funds, and until membership and subscriptions are greatly increased a Guarantee Fund is necessary. Most Esperantists want to do their share. Think over what is your share, and act accordingly. We need a Thousand Dollar Guarantee Fund to cover our Budget. Every dollar helps.

To summarize:

Annual Membership	\$1.00	
Contributing Membership	3.00	(includes magazine and gives an extra dollar towards expenses)
Sustaining Membership	10.00	(includes magazine and \$8.00 towards expenses)
Subscription to Magazine	1.00	
Subscription to Guarantee Fund	(?)	
Subscription to Book Fund	(?)	

Do it now!

EDITORIAL MEDITATIONS

We need badly some one Esperantist who will keep in touch with all educational matters, more especially Esperanto educational news, and compile data thereon for the use of *Amerika Esperantisto* and of *Internacia Pedagogia Revuo*. Of course we are not amenable to the Enquiry on Educational Aspects of Esperanto Teaching to be held in Geneva some time in April for the benefit of the League of Nations, but we can hardly hope to convince schoolboards without some ready data to argue upon. Who will serve?

Science and other technical journals have had articles but it is impossible for the editor to get data on all these, if not sent in to him.

KALUNGA TA POPII

Muujuni ua Nangolo oku a li omkulukazi komukunda ua kama k'Uukuanjama. Mesuku limue oku a shikama koshini she a tsu iilia. Nena a uvu, elaka ali popi, tali ti: Mundu! Endjeo! Endjeo uushuila! Noje a lengalenga nani ina muna sha.

Nena a tamek' oku tila. A shi, pamue Kalunga? Kalunga shili! Nena elaka la Kalunga ali popi, tali ti: Ando Nangolo ta pendje ongombe ontuze, ando inapu ja oluhepo koshilongo she. Ando omfula ji loka, n'iilia jimena n'on-gombe ji tangalala muushuita muujuni ue. Nomkulukaze a sikama nsuija, a i kuua, a hapula ohapu ja Kalunga noshihuna shoka. Nangolo a tuma nsuija, nongombe ontuze a kaetloa, a tsueloa ku Kalunga. Nu inapu ja oluhepo koshilongo sha Nangolo.

DIO PAROLAS

Ambolanda Fabelo

En la regno de Nangolo troviĝis maljunulino en regiono dekliva al lando Uukuanjama. Unu tagon ŝi staras tie apud sia pistujo pistante iiliojn. Tiam ŝi ek-aŭdas, voĉo parolas, diras: Homoo! Donu! Donu farunon! Ŝi rigardadas, sed nenion vidas.

Tiam ŝi komencas timi. Pensas, eble Dio? Vere Dio? Tiam la voĉo de Dio parolas, diras: Se Nangolo donas al mi nigran bovon, tiam ne venos malsato en lia lando. Sed pluvus, greno kreskadus kaj brutaro tumultludus sur la herbejoj de lia regno. Nangolo tuj sendis. Oni alkondukis nigran bovon kaj oferis al Dio. Poste ne venis malsato en la lando de Nangolo.

Rakontis Misiisto P. Kurvinen
Trad. A. Ln., en Kristana Espero.

Internacia Antaŭkongreso en Lubeck, 1922

Okaze de la XIVa Internacia Kongreso en Helsinki la Lubeckaj esperantistoj intencas aranĝi **Antaŭkongreson**. Sajnas konvene, en Lubeck interrompi la vojaĝon dum du tagoj kaj rigardi la multajn antikvajn vidindaĵojn de la famekonata Hanse-urbo. Sub la kondiĉo, ke sufiĉe da partoprenantoj anoncos sin, estos aranĝata karavano de Lubeck al Helsinki, tien kaj reen, per speciala vaporŝipo. Tiu aranĝo celas malkarigi la vojaĝkostojn, por ebligi ankaŭ al neriĉaj samideanoj la ĉeeston en la kongreso. La vaporŝipo estos luata dum la tuta daŭro de la tien- kaj reen-vojaĝo, kaj dum la kongreso en Helsinki, kie ĝi samtempe farigas la hotelo de la partoprenantoj. Pri la kondiĉoj kaj prezoj en venontaj komunikoj.

Pro la luo de la vaporŝipo estas necese, kiel eble plej baldaŭ sciigi la nombron de la kunvojaĝantoj. La kongresanoj, kiuj volas uzi la Lubeckan entreprenon, bonvolu sendi siajn adresojn al Heinrich Selmer, Falkenviese 11, Lubeck, Germanujo.

Lubecka Esperanto Societo, Dr. A. Mobusz, prezidanto.

La provizora programo por la Antaŭkongreso estas:

London, la 31. VII, vespere—akcepto de la kongresanoj.

Mardon, la 1, VIII, antaŭtagmeze—akcepto de kongresanoj; tagmeze—Salutkunveno; posttagmeze—rondirado tra la urbo; vespere—solena kunveno kun publika parolado.

GOD SPEAKS

A Fable of Amboland, S. Africa

In Mangolo's kingdom, there was once an aged woman, in the region sloping downward to the land Uukuanjama.

One day she is there, standing beside her mortar, pounding iili. Then she hears something, a voice is speaking, is saying: Human! Give! Give flour! She looks around, but sees not a thing.

Then she begins to be afraid. She thinks: Maybe it's God? Really God? Then the voice of God speaks, and says: If Nangolo gives me a black ox, then shall hunger not come in his land. But it would rain, grain would grow, and the cattle would frisk upon the meadows of his realm.

Without delay Nangolo sent the ox. A black ox was led forth and offered up to God. Thereafter came not hunger to the kingdom of Nangolo.

Translated from Kristana Espero, No. 6, 1921, by N. W. Frost.

NOTES

The scientific man is not easily convinced, indeed he goes on the principle that all men are deceivers until proven innocent. We lately heard of one scientist who felt that for a real test of Esperanto there was requisite a language none of whose elements

were known to the translator out of Esperanto and translations into various languages must show a like rendering of the Esperanto and of the original. Now we are always willing to oblige, so, disclaiming any knowledge of either the original tongue or the Finnish, we present the followning translation (to be found in Kristana Espero, No. 6, 1921).

We put in the word 'once,' for that is implied in the Esperanto past, which does not extend into the present. Also we made a paragraph extra, because in English this is required by the change of tense. 'Iili,' as a note in K. E. informs us, is a kind of grain. We translate 'homo' as human, for in Esperanto the term is not limited in sex. Likewise we translate 'bovo' ox, but it might mean any mature bovine creature; we ordinarily specify virbovo for bull and bovino for cow. 'Brutaro' is cattle in the wider sense, any domestic herded things. 'Tumuludus' is literally to cut capers, to play boisterously. The change from the future in 'venos', shall come,' to 'pluvus' etc., marks the transition from a direct promise to a conditional description.

A note tells us that Nangolo was king in the region named Ondonga.

Merkredon, antaŭtagmeze—daŭrigo de la rondirado tra la urbo; posttagmeze—ekskurso en la ĉirkaŭaĵon de Lubeck; vespere—somera dancado en la arbaro kaj fino de la Antaŭkongreso.

Jaŭdon, frumatene—forveturo de la vaporŝipo al Helsinki.

Kotizo por la Antaŭkongreso:—... Usono kaj Kanado \$1.50.

KIAM NENIA STELO BRILAS

Estis en la tagoj de Sanktuloj Simono kaj Judo, ke mia onklino, pri kies ekzisto mi ĝis tiam apenaŭ iam aŭdis, venis por forpreni min el la lernejo. Jen fine la granda momento! La tago estis malluma, sed

dum mi faris pakajon de miaj vestoj en la dormejo, subite la suno ekbrilis, kaj ore heligis la statuon de Madono en niĉo tie. Tio estas bona antaŭsigno mi opiniis. En la biblioteka ĉambro atendis min virino mirinde vestita, sed kies vizaĝon mi neniam povus ŝati. Fratino Arĉanĝela puŝis min al ŝi dirante: "Jen via nevino, nia kara Katrina. Ŝi estas malsprita je studo, sed faras bone la domlaboron. Ni ĉiuj ŝin amas."

Mi hontis pro tio ke oni tiel sciigis al mia parenco mian grandan kulpon. Tamen la virino, mia onklino, ŝajnis senzorga ĉu mi ion jam lernis aŭ ne. Plaĉis al ŝi, evidente, mia eksterajo. Kiam mi riverencis, ŝi pinĉis al mi la vangon kaj diris: "Efektive, malgrandulino, mi sentas deziron ĉirkaŭpreni vin." Mi tion evitis, turnante min al Fratino Arĉanĝela, kiu ekfariĝis en tiu momento io al mi tre kara. Ŝi estis Fratino, estaĵo reprezentanta ĉion kio estis ĝis tiam protekta por mi. Mi kisis ŝian robon. Tiam la onklino prenis mian manon, kaj ni foriris, lasante Fratinton Arĉanĝela rigardanta, ne al mi sed preter ni, al la malproksimo, kvazaŭ ŝi vidus al kio mi iras.

En tiu tago, por la unua fojo, mi min trovis en vagonaro. Dum horoj ni veturis... mi neniam imagis ke la mondo estas tiom vasta. Ĉio tre plaĉis al mi, ĝis kiam mi notis en la urbetoj sole la standardojn de la Ŝtatoj, kaj ekkomprenis ke mi ne estas plu en kara Quebec, lando de miaj praavoj; tiam mi devis plori.

Tiom da novaj impresoj mi spertis ke mi laciĝis, kaj de longe estis dormanta, kiam en la vespero ni alvenis ĉe granda urbo. Tie ni eniris aŭtomobilon—jen alia nova sensacio—kaj veturis al la onklina domo. Bela hejmo ĝi estis, komence mi opiniis, sed...nu, iel mi ektimis, tuj kiam mi eniris tiun domon. Ne plaĉis al mi tie. La onklino rimarkis ke mi rigardadis ĉirkaŭen senkonfide, kaj krude ridegis. "Jen fine vi estas inter la vivantoj," ŝi diris. "Vi ne plu estas enterigita. Vekiĝu. Estu vivulo."

Ĉu estas devige ĉion skribi? Mi lasos tie ĉi ion al imago, dirante nur ke en tiu sama nokto mi forkuris de tiu domo. Jes, anstataŭ resti ĉe la onklino, mi prefere kuris for, en la nokton, ne zorgante kien, ne pripensante ke mi ne scias la lingvon de la popolo de tiu urbo, kies nomon mi eĉ ne ankoraŭ aŭdis...sen konsidero al io ajn, krom tuja disiĝo de tiu virino. Mi volas neniam ŝin revidi.

Sed ho! mi tre timiĝis, min trovante sola en la nekonata mondo, kie, laŭ tio kion oni tiom ofte instruis al mi, estas speciale danĝere por knabino. Pro la konfuzo de stratoj mi baldaŭ ne povis reveni al la onklino, se mi dezirus, sed tian deziron mi ne havis. Venu kio povus, decidite estis ke mi ne vivos kun ŝi. Sed kion mi tiam povis fari? Mi mem ne sciis. Post longa marŝado, kun kuraĝo de malespero, mi komencis haltigi virojn, petante: "Faru al mi komplezon, kaj diru kie knabino sen hejmo aŭ mono povas dormi." Sed neniu min komprenis.

Mi estis tre mizera, senespere kaj sencele vaganta tra mallumo kaj pluvo, kiam mi ekpensis pri tiuj lastaj vortoj de mia mortinta amikino: "Se iam venos malespero, serĉu vi la simbolon." Je tiu rememoro estis kvazaŭ radio da lumo ĉiela trapenetris antaŭ mi la

nigran nokton; estis kvazaŭ ia pale-verda steleto briletis gvide tie supre, kie efektive nenia stelo brilis. Sammomente, mi rememoris kiel la statuo de Nia Sinjorino tiun matenon lumigis por mi, kaj espero eniris la koron. Genuante en ombro—estis sufiĉe da ĝi ĉie—mi alparolis la Virgulinon: “Sankta Stelo de la Mateno, gvidu min, mi petas, al helpo en nuna bezono mia, per tiu alia stelo, laŭ deziro de anĝelo Fratino Madeleine-Celeste, mia amiko kun vi.”

Mi levigis konvinkita ke nur verdan stelon mi devas trovi por havigi al mi iun kiu estos amika protektanto, kiu volonte zorgos pri mi en mia malfeliĉo. Unue, mi serĉis ĝin sur preterpasantoj; kaj al kelkaj el ili mi alparolis per: “Estu tiel bone, sinjoro, kaj diru kie sin trovas verda stelo.” Sed neniu portis stelan pinglon; neniu konis la francan versajne en tuta la urbo, krom tiu evitinda onklino mia. Krome, pro la ventego kaj malfrua horo, la preterpasantoj estis maloftaj. Venis al mi en la menson, kiam mi malesperis pri tia agado, ke la verda stelo tute ne devas esti ornamo vesta. Aliloke, do, mi devis rigardadi por ĝi, sur konstruaĵoj kaj domoj ĉiuspecaj ĉie, kaj tion mi faris longatempe.

Tre laca, sed kun plena konfido ankoraŭ mi estis, kiam mi vidis en lumo ellasata tra pordo kie viro eniras, verdan stelon grandan, sur la tiea herbejo. Mi tuj enkuris post li, el la ventego, en tiun domon, fidante blinde ke tie mi trovos la promesitan bonfaranton. Kaj malgraŭ ke tiu viro nek komprenis min, nek volis havi min ĉe li, mi firme decidigis resti apud la simbolo. Estis agrable tie, kaj krome, kian alian elekton mi tiam ankoraŭ havis?

Kiam fine en tiu domo mi ekaŭdis la muzikon tute ne atenditan de tiu ĉi kara lingvo, kiajn emociojn mi havis! Estis kvazaŭ bona feino per magiaj vortoj ŝanĝis la mondon. Jam oni diris ĉi-supre kiel tio okazis. De tiu momento, pere de tiu ĉi dolĉa parolo, mi min trovis inter geamikoj—rekompencu ilin la bona Dio. Oni tuj konstatis ke mi agis saĝe, forlasante la onklinon, kiu laŭ famo ne estas deca persono por zorgi pri juna knabino. Ili kiel eble baldaŭ sendis min malproksimen de ŝi, al **Louisiane**, kie mi jam estas de kelkaj semajnoj; kaj havas konforman por mi okupon ĉe aliaj geamikoj, francaj “Esperantistoj”—jen nova vorto por mi.

Kial mia kara instruistino kaŝis antaŭ mi ke la ludlingvo estis vere lingvo reala, vivanta? Per ŝiaj vortoj supre cititaj ŝajnas ke ŝi, pro promeso al iu, ne rajtis disvastigi la ideon de tiu ĉi Esperanto movado. Certe, ĉe mi ŝi tion ne faris eĉ per la plej eta aludo. Ŝi celis ne propagandi la ideon. Mi atingis al tiu ideó granda laŭvoje de la lingvo mem; ne al kono de Esperanto per deziro realigi ĝian idealon, kiu estas kaŝita en ŝia koro.

Ofte mi sendas dankojn supren al la bona amikino, por tiu instruo ŝia kiun mi supozis amuzo; kaj tiam mi sentas ke ŝi ĝojas pro la feliĉo mia, per tiu amuzo rezultanta. Kaj vi, leganto, kiu, pro la fakto mem ke vi povas legi, devas havi simpatiojn kiel ŝi—ĉu vi ankaŭ ne ĝojas kun mi?

Fino

LA GAZETARO

The following list aims to give:

Name, address, frequency of issue, number of pages, price, and languages used.

- Amerika Esperantisto**, Cambridge 38, Mass., Usonia, m. 16p. 2sm. (\$1.00) F Eng.
Argentina Esperantisto, Bdo Irigoyen 128, Buenos Aires, Arg., 3m. 12p. 3sm. Se
Arguso, M. C. Rodriguez, Ap. 2482, Mexico, D. F., m. 8p. \$1.00 Se
Belga E-isto, Fern. Mathieux, 15 ave. Bel Air, Uccle, Belgium, 2m. 32p. 10bf. E
Bizantio, A. Stamatiadis, Tepe Bacı 59, Pera, Constantinopolo, m. 32p. il,
 15 sf. Efh
Brazila E-isto, Praça 15 de Novembro 101, Rio de Janeiro, 2m. 6lp. il 5ff. Ep
British Esperantist, 17 Hart St., London W. C. 1, England, m. 8lp. 6s. Eeng
Bulgara E-isto, bul. Maria Luiza, 46, Sofia, Bulgaria, m. 16p. 1.5sf. Be
Bulletin de S. Francaise P. E., 5, ruede Ravignan, Paris 18, m.? 6lp. 5ff. Fe
 (Bulteno de F. S. P. P. E.,—kun Bulletin de S. F. P. E.)
Bulteno de Hokuriku Cor. Exch., P. O. Box 18, Kanazaŭa, Japan, 3m. 8lp. 2sm.
 Ej. eng.
Catalunya Suno?? (J. Amades) Peu de la Creu 10, Barcelona, Spain, ? 4lp. 0 C
Corriere Balcanico Esperantista, via Abate Gimma, 52, Bari, Italy, m. 4lp. 6l. I
 (Cehoslovaka Gazeto—kun Nova Eŭropo).
Danziga E. Asocio, **Mitteilungen**, Danzig, Stadtgraben 5 in der Verkehrzentrale,
 m. 4p. hekt. G script, 6M. Ge
Der (Deutscher) **Arbeiter E-ist**, P. Reuchenbach, Göppersdorf bei Burgstaedt
 i Sa., Germany, m. 8lp. 12M. Ge
 (Dia Regno—kun Kristana Espero).
Egipta E-isto, G. Wilken, Farahdeh Str. 4, Aleksandria, m. 12p. 5sf. Efiha eng.
Eklezia Revuo, Farnley Tyas Vic., Huddersfield, England, 3m. 20p. 3s. E
La Esperantisto, Wien II, Postamt 34, Austria, m. 4np. 40sm. E
E-ista Junularo, Beaugé, M.&L., France, 2m. 4lp. 2ff. E
L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento, Italy, m. 32p. 2sm. Ei
Esperanto (U. E. A.), 12 bd. du Théâtre, Genève, Switzerland, m. 20lp. 4sm. E
E-o Finnlando, Esp. Of. Finl., Kasarminkatu 20, Helsinki, m. 15p il. 2.5sm. E
E-o Ligilo, Majorsgatan 12, Stockholm, Sweden, **BRILLE**, E
E-o Praktiko, F. Ellerzieck, Berlin S59, Wissmannstr. 46, Germ., m. 24p. 36M. E
E-o Triumfonta, Köln-Horrem, Germany, w. 4np. il. 6sm. E
Esperantsky Zpravodaj, Praha II 2032, Chekoslovakia, m. 8p. 10 KC C
La Espero, E. S. E., Stockholm 1, Sweden, m. 8lp. 4.5KS. eS
La Espero, Seikooŝa, 3 Ebisu-ŝo, Minamiku, Osaka, Japan, m. 28p. il. neab. JE
Espero Katolika, E. K., Oudenhout, Netherlands, m. 20p. 5ff. E
Espero Teozofia, V. Cimr, Krakovská ul. 17, Praha II, Chekoslovakia, m.? 8p.
 laŭvole, E
Estonia Esperantista Revuo?, Tallinn, Esthonia, tw. neab.
Export Esperantist, E. M. Pope, room 401, 102 N. Wells St., Chicago, Ills.,
 Usonia, m. 4lp. \$1.00 E
La France Postale Esperantiste, M. Michelis di Rienzi, 20 ave. Reillé, Paris 14,
 France, m. 4p. 3ff. F
France Esperanto, 51, rue de Clichy, Paris IX, France, m. 8p. 8ff FE
Germana E-isto, Dresden I, Struvestr. 40, Germany, m. 24p. 40M. GE
Harmonio, **Bul. de la Esp. Instituto?**, 1 W 34th St., New York, N. Y., Usona,
 3m. 4p. E.
Hispana E-isto, Kom. J. Mangada R., Jaca, Huesca, Spain, m. 16p. il. \$80 E.
Hungara E-isto, Szeged, Szentharomsagutca 30, Hungary, m. 12p. 50KH E
Hina E-isto??, S. Esp. A., 1780 N. Sze Čuen Rd, Sanghaj, China, m. 1.4sm CE
Internacia Komerca Revuo, Hj. Unger &Ko., Zürich 1, Switzerland, m. 24p.
 10sf. E
Internacia Pedagogia Revuo, J. Jacobs, Boomsche Steenweg 444, Antwerpen,
 Belgium, m. 8lp. 2sm. E
Internacio? rm. 203, 15 Park Row, New York City, U. S., w. mm. neab. Eeng.
Intersaŝo, Bezierza Stelo, (L'Echange), 3, rue de Capus, Béziers, Hérault,
 France, m. 32p. il. 7.5 ff. Fe
Junula Voĉo, Kilinskiego 28, Lodz, Poland, ? ?hekt. ? E

- Junularo**, Privoz, Marxova 111, Ĉeĥoslovakia, m. ? 7KĈ. ĈE
Kamarado, Praha, Vrsovice 125-I, Ĉeĥoslovakia, m. hekt. ?
Kagoŝima E-isto, K. E. Klubo, 161 Koraj-ĉo, Kagoŝima, Japan, m. 20p. hekt. neab. Ej
Kalifornia Folieto, E. A. C., 946 Central Ave., San Francisco, Calif., Usonia, 3m. 2p. mim. neab. E
Kataluna E-isto, Carme 30, Barcelona, Catalonia, Spain, m. 20p. 5pes. E
Katolika Mondo, Paulus Eld., Karmeliterplatz 5, Graz, Austria, m. 4np. 2sm. E
Na Komenco? Nikola Lisac, Travnik, Bosnia, Jugoslavia ????
Komunist E-isto, R. Arco, Marquez d'Allegrete 30, Lisboa, Portugal, ?
Kristana Espero, E. Penttinen, Kaustinen, Suomio, Finnland, 2m. 16p. \$.50 Ef
Libero, Sanko Esp. Grupo, IIIa Nacia Kolegio, Kioto, Japan, m. 42p. il. hekt. neab. E
Literaturo, C. H. Edmonds, 19 Dellcott Rd., Welwyn Garden City, England, 3m. 24p. 1.25sm. E
Litova Stelo, P. Medem, Kaunas, Lithuania, m. 8lp. 4sm. (24 auk.) E
La Marto, Haida, Ĉeĥoslovakia, m. 8lp. 20 P.O. respondcoupons, Eg
Nord-Albingsche Esp. V., Mitteilungen, H. Böbs, Utecht bei Lübeck, Germany, m.? 4p. hekt. ? G
Monda Poŝto, J. Thalman, Fischenthal, Zürich, Switzerl'd, 2m. 8lp. 4sf. Efgeng.
Le Monde Espérantiste, 3, rue Sophie Germain, Paris 14, 2m. 8lp. 4ff. eF
Nederlanda Esperanto, A. Kloek, 1e Sweelinckstr., Amsterdam, Netherlands, w. 4p. 4ff. eD
La Nia, A. Chapman, Walton Highway, Wisbeck, England, 3m. 4 paĝetoj .25sm. E eng.
Nova Eŭropo, Praha II, Tešno 10, Ĉeĥoslovakia, m. 8 lp. 1 sm. E
NovaTagiĝo, Interpopola Rondo Esperanta, Sekretariejo, Ligo de Nacioj, Genevo, Switzerland, m. 16p. mim. neab. E
Nova Tempo, Ges. M. b. H., Wien VI, Mollardgasse 55, Austria, m. 8lp. 3sm. E
Novaj Tempoĵ, S. Vittecoq, Sassetot, Bacqueville, S. I., France, m. 4lp. mim. 1.50sm. E
Nowe Tory?, Bydgoszcz, Ossolinskich 12, Poland, ½w. 8lp. laŭvole, Epg
Oficiala Gazeto Esperantista, 51, rue de Clichy, Paris, France, 2m. 24p. 10ff. E
La Paco, O. Dai gaku Esp. G., Otani Univ., Kioto, Japan, 3m. 32p. hekt. neab. E
La Progreso, Frant Halm, Plzjen, Premyslova 50, Ĉeĥoslovakia, m. 12lp. 25 KĈ. Eĉ
La Provo, Dro. Dušan Maruzzi, Statistikejo, Zagreb, Jugoslavia, 2w. 4lp. mim. 24 P. O. respond coupons, EJ
Regeneracio??, Lauria 39, Io, Barcelona, Catalonia, Spain, ? ? ? ES Catalan
Revuo Orienta, J. Esp. Inst., Uŝigome Sin Ogaŭamaĉi III, 14, Tokio, Japan, m. 16p. 2.5 Yen Ej
La Rejna Stelo, M. H. Ferez, 19, rue Glaubitz, Strassburg-Neuhof, France, 2w. ? ? ?
La Semisto??, Mendizabal 3, Sabadell, Catalonia, Spain, m. 12p. ? eC
Senhalte, Tisztevelő telep, Lucenec, Slovakia, ? 8p. hekt. 1sf. E
Sennacieca Revuo, 177, rue de Bagnolet, Paris XX, France, m. 16lp. 2.5 sm. E
Skolta Esp. Ligo, Bul. de, C. B. Quain, 134 Church Rd., London N. 1, England, m.? 4p. \$.43 E
Suda Kruco, Box 1367, Elizabeth St. P. O., Melbourne, Australia, m. 16p. 5ŝ. E eng.
La Studento??, Prof. E. Bobrowski, St. John Kanty College, Erie, Pa. 6m. ???
Sub la Ruĝan Standardon, Kronstadt, Poŝtk. 918, Russia, ? 8p. 2000R. E
Skola Eperanta, Jilská 24, Praha I, Ĉeĥoslovakia, m. 10p. 4sf. C
Travailleur Espérantiste, 177, rue de Bagnolet, Paris 20, France, okaze 2lp. 0 F
Tagiĝo, P. E. S., E. Fethke, Kordeckiego 1a, Bydgoszcz, Poland, m. 4p. 120 P.M. E
Vegetarano, O Bünemann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrugchaussee 38,6, Germany, 2m. 8lp. 1.5 sm. E
Verda Amiko, Komerca Kolegio, Osaka, Japan, ? ? hekt. ? neab. ?
Verda Ombro, Esp. Soc., Tai ho ku, Formosa, Japan, m. 4p. 0.8sm. Ej

- Verda Standardo?**, Zamenhof Str., Pekin, Pei-min, Cang ŝu, Ciang su, China, 2w. 4p. ? ?
- Verda Utopio**, 5265 Uehommoči 7ĉome, Minami-ku, Osaka, Japan, m. 16p. il. 1.7 Yen E
- La XIIIa**, A Pitlik, Nerudova 40, Praha III, Chekoslovakia, ? 8p. il. 2ff. E
Announced but not yet issued:
- Esperantio**, P. Hitrow, Berlin-Charlottenburg, Goethestr. 15, Germany.
- Fervojista E-isto**, Praha II, cp 1743, Chekoslovakia, ????
- Internacia Medicina Revuo?**, Dro. Karlo Mezei, Teréz kőrut 4, Budapest VI, Hungary.
- La Monda Politiko**, 4 Princeton St., London, W. C. 1, England, ? ? 3½ŝ ?
- La Ondo de Esperanto**, A. Saharov, Moskow, Russia, Ulangskij per., 17, lg.6
- Scienca Gazeto**, S. Kamaryt, Bratislava, Telocvicná 3, Chekoslovakia,

The magazines listed below have had at least an evanescent existence, perhaps some are still extant; in Russia, especially, owing to the state ownership of paper, and the scarcity of all materials, Esperanto magazines exist only thru one or two issues, or at least no more reach us; some never do.

- [Cina Brileto?? K. C. San, 11 Lin yen Road, W. Gate, Sang haj, China
- [Internacia Socia Revuo, W. Nutters, van Ostradestr. 94, Amsterdam, Nederlando, 3m. ???
- [Hebrea E-isto], en Mit. des Daniel Bundes, München, Weinstr. 6, J. Schönfeld.
- [Jurnalo Vivanta??, P. E. Servo, Kordieckiego, Bydgoszcz, Poland, ? 1p. hek.t ?
- [La Mondo??, Canton, China.
- [Meksika Stelo,??
- [Orienta Stelo, Bahaja Domo, 14 ukjo maĉi, Jocija ku, Tokio, Japan, m.? ? ? J
- [Samideano??, O. Ziegler & Ko., Marktredeutz, Bavaria, ? 20p. 2.5 M. E
- [Unuigita Tuthomaro, Bahai Verlag, Hamburg 15, Germany, m. 4p. laŭvole E
- [Voĉo de la Popolo, Sin pak, 50 Ping Yeung Li Str., Fat San, Canton, China, m. ĝis polica interrompo, 16p., ? Ce eng.
- [Radio, Siedlce, Poland, ? ?tw. ??
- [Agitanto, Kronstadt, 918, Visokaja ul. 27, loĝ. 2, Russia, ? 2ns. 2R. K. eR
- [Al Eterna Lumo, Buro Porcyne, Vitebsk, Russia, ? 2ns. ? ?
- [La Esperanta Movado, Kronstadt, Prospekt de Lenin 30, Russia, m. 16p. ? eR
- [Esperanto Gazeta?, T. Hoves, Tomsk, Pk. 34, Siberia, ? 1p. 50?R. rE?
- [Esperanto Informilo, Italjenskaja 21, Petrograd, Russia, 2w. 16p. 1000R. Er
- [Espero, Fontanka 17, loĝ. 5, Petrograd, Russia, 2m. 8p. ? Er
- [Homela Esperantisto, Homel, Russia ???
- [Hersona Esp. Soc., Informa Bul. de?, Kherson, Russia, yearly
- [Juna E-isto, P. Unuiĝo de Junaj E-istoj, Petrograd, Russia, m. 2p. hekt. ? ?
- [Juna Mondo, Arbat Sivcev, Vrajok 42, Moskow, Russia, ????
- [Omska Bulteno?, O. Esperanto Soc., Omsk, Siberia. ????
- [Ruĝa Esperantisto,?, Studionaja 53, Nijni Novgorod, Russia, ? 12p. ? ER
- [Sub la Ruĝan Standardon, Kronstadt, Poŝtk. 918, Russia, ? 8p. 2000R. E
- [Eskiano, Kronstadt, Russia, m. 2np.

The following we believe dead, but would like certain word: El Esperanto, Santa Fe77, Bahia Blanca, Arg., Verda Stelo, Tomsk, Eho, ? Bulgaria, Laboro, Travessa de Agua da Flor 55,-1o, Lisboa, Portugal, Bulteno de Kataluna Esp. Fed., Universo, Holanda Pioniro, Franca Esperantisto.

Among the notable constant users of Esperanto are:

- La Patrie Ladine, Libreria Zorutti, Bologna, via de Gombruti 5, Italy
- Portugal Commercial e Industrial, ruo do Carmo 90, IIa, Lisboa, Port. m. 24 lp. \$1.00 E fako.
- Kozép Duna [Meza Danubo], Pozsony-ut. 4-ei Budapest V, 2w. 12 p. EHGf
- Le Chrétien Libre, 37 rue de la Fosse-aux-Anglais, Melun, S&M, France.
- The American Cooperator, Llano Publications, Leesville, La, m. 24lp., \$1.00

.....

ABBREVIATIONS:—m.—monthly, 2m.—bi-monthly, 3m.—quarterly, 6m.—semi-annual; w.—weekly, 2w.—fortnightly or semi-monthly, ½w.—twice a week; okaze—occasionally (as funds permit). p.—pages, lp. large pages, np.—

newspeper size pages, paĝetoj—tiny pages; il.—illustrated, mim.—duplicated type lettering, hekt.—reduplicated script (or not known), tw. typewritten. \$—U. S. dollars, sm.—spesmilo (a weight of gold equivalent to ½ U. S. gold dollar), bf., ff., sf.—Belgian, French, Swiss francs, fi—Finnish marks, fl.—Dutch florins (gulden), l.—Italian lire, pes.—Spanish pesetas, M.—German marks, P.M.—Polish marks, K.—Austrian krone, KC., KH., KS.—Bohemian, Hungarian, Swedish krone, ŝ.—British shillings; neab.—not for subscription, laŭvole—in return for donations. E—Esperanto, j.—Japanese or Jugoslavtic, h.—Greek, p.—Portuguese or Polish, a.—Arabic, ĉ.—Chinese, d.—Dutch, c. Catalan, eng.—English. Other letters require no explanation; capitals imply predominant use of the language. ?—implies doubt, after name of magazine, doubt as to continued existence; otherwise, lack of definite data.

We assume no responsibility for the present or future survival of the above magazines, please notify us if inaccurate or incomplete. (The Spesmilo provides a unit of calculation not subject to fluctuations of the exchange, and thus permits of maintaining constant price lists. We suggest its use by non-Esperantists.)

BEST TRANSLATION LA ISMOJ

Individualismo: La teorio, ke homa agado ĉiam estas gvidata de koncepto de la individuo pri sia persona intereso, kaj ke, pro tio, homa kuniĝo* devus* esti tiel aranĝata, ke ĉiu mensosana* maturulo estu libera agi laŭ sia propra volo, kun rezervaĵo,* ke, en tia agado, li* ne kontraŭagu la liberecon de aliaj personoj.

Kolektivismo: La teorio, ke homa kuniĝo nepre devus* esti regata de kolektiva organizado, por ke iuj individuoj ne kontraŭagu* la egalan liberecon de aliaj; ke, ĉar personoj kuniĝas por produkti iajn objektojn, la posedrajto al tiaj objektoj devenas de volo de la unuigo* anstataŭ deveni de penado de la individuoj; kaj ke, pro tio, la unuigo* devus* posedi kaj funkciigi la tutajn rimedojn de produktado kaj disliverado.

Egalrajtismo: La teorio de racia aplikado de individualismo al homa kuniĝo*; la teoro, ke ĉiuj rajtoj al ekskluziva posedo devenas de penado de individuoj; kaj ke, pro tio, la bazado de ĉiu interŝanĝo de rajtoj al ekskluziva posedo sur pohora maturula laboro* ekzistigos kaj konservos egalan liberecon, kaj per tio kaŭzos, ke la merita* instigilo regu homan agadon, kaj tiamaniere malnecesigos ĉiun aplikon* de la volo de iuj personoj super aliaj.

Tradukis D. M. Lynds, 3008 Mabel St., Berkeley, Calif.

SUGESTAJ NOTOJ

homaj rilatoj:—kuniĝo pli ĝuste signifas ekon ol adon aŭ eon.

devus:—prefere ne uzu devus krom en kazo de kondiĉo aŭ dubindo; devus="would be under obligation to," "might (well)." devas pli trafas, ĉu ne? mensosana:—komparu racia, nefreneza; mensosana ankaŭ estas prava. kun rezervaĵo.....:—kondiĉe ke (ties) tia agado ne kontraŭagu.... (Kvankam ni nur tradukas el angla lingvo, ni konservu la neŭtralecon celatan de la verkisto, tial evitu "li.") devos:—ĉu pli ĝusta ol devas? kontraŭagu:—komparu surpaŝu, eble pli zamenhafa. unuigo:—de volo de la kolektiva ularo, oni kolekt-

ive deva(o)s posedi... rimedojn:—ne, la tutan rimedon, aŭ ĉiujn la rimedojn. sur pohora...:—kp. sur maturula laboro po horo. la instigilo, Merito; la nura vorto "merita" ne sufiĉe klara tie. ekzercon; "aplikon" signifas alĝustigon.

TRANSLATE

Nations cling to their language because they feel that language is the sign of nationality. As one speaks, so one thinks; as one thinks, so one is. Great nations, strong and advanced and numerous, prove their belief in the essential importance of language by the efforts they make as individuals and small communities, when surrounded by foreigners, to maintain their language and pass it on as a precious heritage to their children. They prove it by the efforts they make as governments to ground and solidify their political influence in their possessions by spreading their language as rapidly as possible among subject races. Small nations demonstrate their belief in the national importance of language by the almost insane pride and jealousy they show in defense of their tongue. Subject races put their faith in language as the medium for awakening and sustaining national feeling, and keeping alive hopes of future emancipation.

—Gibbons: *The New Map of Africa*, pp. 72,73.

Owing to the considerable interest taken in the Translation Exercises we request that all who want corrected mss. returned enclose a stamped self-addressed envelope, as the loose stamp and address do not always cling to their own translations. We do not pretend that the corrections or suggestions are above reproach. Still, think before you reject our suggestions, don't merely quote some dictionary as proof of our inaccuracy; the basis we use is the officialized vocabulary; fundamenta vortaro and aldonoj; any word outside we mistrust and replace if possible. We regret the press error in the January issue, of 'malertiga' for 'mallertiga.'

ENLANDA MOVADO

New York, N. Y.—La marta barĉo okazos la 11an de marto je la 7.45 vespere ĉe la "Green Witch" 68 East 11th St; neniuj Esperantistoj manku; alvenu kun geamikoj kaj informi la Harmonion 3 tagojn antaŭe por la preparo de sufiĉe da manĝaĵo. Estas deziro, plibonigi la programon, por kio bezonas ĉies helpon.

Harmonio havas interesajn barĉojn. Bela punkto sur la programo de Jan. 14 estis la kantado en duett, kiun kantis S-ro Prof. Pietro Marzen kun F-ino Emma Kloss en Esperanto, kaj post tio S-ro Marzen kantis du kantojn en la germana lingvo. Alvenis el Germanio S-ro Erich Gruhlke, kiu parolis. La ĥoro ankaŭ kantis du kantojn por la plezuro de la ĉeestantaro. La klaso en la Washington Irving High School okazas ĉiun mardon je la 8a vespere en la ĉambro 608. La klaso prosperas bone; havas pli ol 40 gelernantojn kaj duono da ĥoro estas uzata por kantado.

—La 11an de Februaro okazis la februara barĉo kun ĉeesto de cent

personoj. La paroladistoj estis S-roj Klačin, Morton, Tereseta Gascon-Ferrer, D-ro Werner Marchand, Silbernik, kaj Reich. Estis nova gasto, alveninto el Portugalujo, S-ro Karlos Pereira Ramos. D-ro Marchand bonege paroladis pri la neceseco por defendo de Darwinaj teorioj, kiuj nuntempe estas atakataj. Li dubas ĉu oni deziras la instruadon de la vero aŭ de dogmoj nur! S-roj Klačin kaj Morton laŭdis la preson de la urbo, ĉar la "Globe" enhavis bonan artikolon pri Esperanto de Addington Bruce, kaj la New York Times, Herald, Sun kaj Tribune, kaj Evening Post anoncis la barĉon. La germana preso de la urbo, kiel New Yorker Staatszeitung kaj New Yorker Volkszeitung, priskribis nian lastan barĉon kaj anoncis ankaŭ la okazantan kun multaj vortoj. La N. Y. Volkszeitung akceptis la delegitaron de la Esperantista Laborista Centro, kaj tre volonte donas spacon al aferoj Esperantaj. S-ro Saville el tiu centro, paroladis ĉe la barĉo, opiniante ke la laborista centro entreprenos ĉion por ke la klaskonscia laboristaro lernu nian lingvon; li ja havis sukceson en la bakistunuigo al kiu li apartenas. Post li paroladis S-ro Walter Simson, angle, Esperante, kaj germane, ĉar venis kelkaj germanoj pro la anoncivitoj en germanaj gazetoj.

La plej amuza punkto ĉe tiu barĉo estis la pianado kaj kantado de S-ro Platon Brunoff, kiu kantis angle, ruse, kaj jude. Li amuzis la ĉeestantaron per siaj propraj muzikajoj. Post lia rusa kantado S-ro Reich tralegis leteron de S-ro Grafov el Rusio, kiu petegis helpo por la malsatantaro en la Volga-regiono. S-ro Klačin ordonis kolekton kiu finis kun preskaŭ \$30.; la Harmonio jam antaŭe forsendis \$50., kaj \$8.50 por la sama celo.

La danco komencis post la 11a horo daŭrante ĝis post la 1a horo en la nokto.

Philadelphia, Pa.—Post iom da senaktiveco la loka societo, iam unu el la plej viglaj en Usono, efektivigis reorganizon kun la jena estraro: Prezo., Harry Test; Vic-Prezo., John B. Savage; Sekretario-Kasisto, F-ino Margaret A. Maisch; kaj Direktoro de Instruado, Miron Perlov. Por festi sian renovigon oni kunvenis en tradicia "Barĉo" en la Hotelo Hanover, la 21an de Feb. Inter aliaj interesaj temoj la societo diskutis la projekton de "Internacia Kongreso de Esperantistoj en Philadelphia en 1926," unue proponita de S-ro Test. Ĉiuj scias ke okazos en "Fratamurbo" post kvar jaroj mondekspozicio. Ĝis nun la inviton al la tutmonda samideanaro oni ne formale faris, sed la societo aprobis la planon reklami per algluaĵoj kaj alimaniere la projekton inter usonanoj. H. W. H.

Philadelphia, Pa.—Laŭ sciigo en Litova Stelo S-ro Vidikauskas intencas kolekti monon en Ameriko por ampleksa litova-esperanta vortaro. Bonan sukceson!

Santa Clara, Kubo—Klubo de korespondemaj Esperanto studentoj fondiĝis; entenas: Pedro Monteagudo, Pedro Pacheco, C. Lanares, O. Novarro, R. Perez Alep, L. F. Campo, C. Garcia, J. M. Arbona, Evilio Jimenes. La prezidanto estas Pedro Juarez Cano, Box 148, Santa Clara, Cuba.

Mexico, D. F.—El Scout, monata organo de Meksika Skolta Asocio, enhavas Esperanto paĝon.

Elk City, Ore.—Klason de 9 lernantoj kondukas J. E. Davis.

Minneapolis, Minn.—Entuziasmigitaj de la lastaj progresoj la klubo renovigas agadon pere de gazetanoncoj.

St. Petersburg, Fla.—La Esperanto Rondo Amikeco kunvenas regule, kaj vekigas multe da intereso. Jan. 13 S-ino E. Owen-Flint gastigis la rondon en sia hejmo. En la kunveno de Jan. 26, oni legis leteron de la Eduka Fako de Japanujo petante la alsendon de fabrikoj faritaj de lernejoj. La urba lernejestro jesis la proponon, kaj nun oni kolektas ekzemplerojn el la fabrikojn de gimnaziojn en St. Petersburg por partopreni tutmondan ekspozicion ĉe industria foiro en Tokio, Japanujo. Tiamaniere St. Petersburg kaj Esperanto famiĝas.

PRESS MENTION

The Toronto Globe, Ontario, Canada, Jan. 16,—published a two-column translation of a long letter received in Esperanto by Miss Alice Wicks of Victoria, B. C. The title was: "Was Any Land Ever Like Ours? Ask Russian Youths in Call to Outside World for Help."

The Christian, 36 Bromfield St., Boston, Mass., for January, published the same letter with an editorial commendation of Esperanto under the title, "A Picture of Russia Today."

The Independent (St. Petersburg, Fla.) Jan. 14—Mrs. Owen-Flint Hostess.

The same, Jan. 26—Esperanto Circle Meets.

The same, Jan. 26—Interesting Meeting of Esperanto Circle.

The same, Jan. 27 and 28—items upon new publicity for St. Petersburg schools thru Esperanto.

H. Addington Bruce, in a copyright article of The Associated Newspapers, published Feb. 6 in the Flint, Mich., Daily Journal, told of Esperanto's Progress as he had learnt of it at the Toronto A. A. A. S. Congress.

In the Boston Herald of Feb. 6 a letter by Mrs. A. D. Frost entitled "What Esperantists Desire," ably exposed the editorial mistake in thinking that we plan to oust English from America.

An article in the Annapolis (Md.) Evening Capitol of Feb. 13, headed "Esperantists Now Have Commenced News Publication," tells of the objects of Export Esperantisto, our new Chicago commercial publication.

The Boston Transcript of Sat., Feb. 25, printed under the heading of Diverse Good Causes a translation by Dr. Lowell, L.K., of the letter from Samideano Grafov, from the famine zone of Russia.

Popular Science Monthly—Standard Code Language for Nations is Possibility

The Washington (D. C.) Star, gave an editorial to "The Present Status of International Language."

WORLD NEWS OF ESPERANTO

There will be an Esperanto convention at the next world congress of Y.M.C.A.'s.

A bill for the official instruction of Esperanto in the elementary schools has been presented in the Japanese parliament just opened, by Senator Ebara.

The T. E. Kuracista Association has made a definite agreement with the Internacia Scienca Association, whereby its chronicle will appear with the first number of the Internacia Scienca Revuo, about the first of April.

One of perhaps the greatest successes of Esperanto has just been brought to our notice. At the Otani (Buddhist) University more than half the students are studying Esperanto with the intent of communicating with Buddhists all over the world and of spreading Buddhism. Any interested in Buddhism should write to Otani University, Muromači Kašira, Kioto, Japan.

The University of Tartu (Dorpat), Esthonia, has introduced weekly lectures on Esperanto.

The Town Council of Cremona, Italy, who had voted 1000 lire for Esperanto already, in January made Esperanto one of the official studies in the Upper Elementary Schools.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

F-ino Gertrude M. Emanuelson, Zion City, Lake Co, Illinois, U.S.A.

S-ro John Stover, 1217 So. Peach St., West Philadelphia, Pa.

S-ro Curto Baste, 36 Xifre Str., Barcelona, Hispanujo.

S-ro Pedro Juarez Cano, Box 148, Santa Clara, Cuba. I.P.K., P.M.

P-ro Joso Lipes, Auburn avenu and Drake street, St. Andrews City, Florida, Usono.

S-ro F. S. Devona, care of Falley Petroleum Co., 510 First Nat'l Bank Bldg., 38 S. Dearborn St., Chicago, Illinois, U. S. A.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Cehoslovakio.

Mrs. Derry, 156 Douglas Rd., Acocks Green, Birmingham, England, d. k. kun Boston aŭ Usono.

S-ro Nikolao Saŝkin, Cistije prudi (apud Poŝtamo) d N 9, kv. N 6, Moskvo, Russia kun ĉiuj landoj pri agrikulturo, socialismo, k. a.—deziras ricevi helpon per provizajoj, semoj, vestaĵoj, kaj diversaj objektoj; reŝendas kolektojn de P. I., gazetoj, jurnalaj, libroj, kaj kion oni deziras.

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

Central Office, 507 Pierce Building, Boston 17, Mass.

March 1, 1922

The two-year Guarantee Fund voted at the Montreal Congress for 1921-22 expired Dec. 31, 1921. Some guarantors made an annual pledge "until revoked" in conformity with the Resolve of the 1920 (New York) Congress; others preferred to continue the original plan, for two years only.

After the discussion of the Guarantee Fund at the 1921 Congress in Boston, the following vote was passed:—

"That the Central Office be authorized to issue a call for subscriptions to the Guarantee Fund stating amount each person is willing to contribute annually and saying for how long such pledge shall continue."

In accordance with the intent of same the following form is presented:

GUARANTEE FUND

For the purpose of defraying the authorized expenses of the E. A. N. A. for which ordinary receipts are insufficient you are asked to subscribe to same under the following conditions:

1. The pledge to cover the calendar years, Jan. 1 to Dec. 31, 1922, 1923, 1924, 1925,—and is void thereafter (*)
2. Calls for payment shall be made only upon due action of the Executive Committee.
3. No call shall exceed 25% of the total pledge, and at least 60 days shall intervene between calls.
4. All assessments shall be made on a pro rata basis (?)

Will you subscribe as above outlined, and how much?

(*) Check the years your subscription is to cover.

 (Please detach and return.)

Subject to conditions made in Central Office circular of March 1, 1922, I hereby agree to subscribe the sum of \$..... towards the Guarantee Fund of the Esperanto Association of North America for the year(s) 1922, 1923, 1924, 1925. (*)

(signed)

(address)